# Ĉiutaga ekzercado 1

*el Baza Lernolibro de Esperanto*

1-1. Esperanto estas facila kaj interesa.
1-2. La rozo estas bela floro.
2-1. Mi estas studento de la universitato.
2-2. Ni estas japanaj Esperantistoj.
2-3. Vi estas tre saĝa.
2-4. Vi estas bona kuracisto.
2-5. Li skribas leteron al vi en Esperanto.
2-6. Vi estas diligentaj.
2-7. Vi estas bonaj kuracistoj.
2-8. Li estas bona knabo.
2-9. Ŝi estas afabla knabino.
2-10. Ĝi estas granda domo.
2-11. Ili estas bonaj homoj.
2-12. Li havas sian domon.
2-13. Ŝi amas siajn edzon kaj filon.
2-14. Ili havas siajn librojn.
2-15. Oni parolas en Esperanto.

3-1. La hundo estas fidela besto.
3-2. Li estas bona instruisto.
3-3. Mi havas grandan domon.
3-4. La rozo estas bela floro.
3-5. Li estas bona knabo.
3-6. Ĉu li estas bona knabo?
3-7. Jes, li estas bona knabo.
3-8. Ne, li ne estas bona knabo.
3-9. Li parolas en Esperanto.
3-10. Ĉu li parolas en Esperanto?
3-11. Jes, li parolas en Esperanto.
3-12. Ne, li ne parolas en Esperanto.
3-13. Ĉu la knabo estas saĝa?
3-14. Jes, la knabo estas saĝa.
3-15. Ne, la knabo ne estas saĝa.
3-16. Ĉu la fraŭlino estas bona amikino?
3-17. Jes, la fraŭlino estas bona amikino,
3-18. Ne, la fraŭlino ne estas bona amikino.
3-19. Ĉu la pomo estas granda frukto?
3-20. Jes, la pomo estas granda frukto.
3-21. Ne, la pomo ne estas granda frukto.
3-22. Ĉu la rozo estas blanka?
3-23. Jes, la rozo estas blanka.
3-24. Ne, la rozo ne estas blanka.
3-25. Ĉu la kato estas granda?
3-26. Jes, la kato estas granda.
3-27. Ne, la kato ne estas granda.
3-28. Ĉu Esperanto estas facila?
3-29. Jes, Esperanto estas facila.
3-30. Ne, Esperanto ne estas facila.
3-31. Kio estas Esperantismo?
3-32. Kiu lernas japanan lingvon?
3-33. Kia estas Tokio?
3-34. Kie vi loĝas?
3-35. Kiam vi laboras?
3-36. Kiom ĝi kostas?
3-37. Kiom da libroj vi havas?
3-38. Kial vi lernas Esperanton?
3-39. Kial li vizitis min?
3-40. Kiel vi fartas?
3-41. Kies domo estas bela?
3-42. Kies libro estas interesa?
5-1. Mi lernas la internacian lingvon.
5-2. Li estas honesta komercisto.
5-3. La domo estas tre bela.
5-4. Ĉu vi iras al la lernejo nun?
5-5. Ĉu vi amas vian malamikon?
5-6. Mi laboris en la laborejo hieraŭ.
5-7. Ĉu vi manĝis multe?
5-8. Kiam vi vizitis Francion?
5-9. Ŝi ne lernos ĉinan lingvon baldaŭ.
5-10. Ĉu vi vizitos Ĉinion?
5-11. Mia filo venos morgaŭ.
5-12. Mi iru al la kursejo.
5-13. Ni manĝu bonguste.
5-14. Ni ekiru.
5-15. Ni kantu kune.
5-16. Li laboru.
5-17. Vi venu morgaŭ matene.
5-18. Vi ne plu memoru la aferon.
5-19. Bonvole, dormu trankvile. (Bonvole, dormi trankvile)
5-20. Estas tre ĝoje, ke mi renkontis vin.
5-21. La fakto, ke li estas sincera, estas vera.
5-22. Mi ĝojas, ke vi fartas bone.
5-23. Ĉu vi pensas, ke Esperanto estas utila?
5-24. La patrino deziras, ke gefiloj studu diligente.

6-1. Kio vi estas?
6-2. Mi estas instruisto.
6-3. Mi estas oficisto.
6-4. Kio estas ĝi?
6-5. Ĝi estas pomo.
6-6. Kiu li estas? (= Kiu estas li?)
6-7. Li estas Lazaro Ludoviko Zamenhof.
6-8. Kiu estas la rozo?
6-9. Ĝi estas la rozo.
6-10. Kio estas la tulipo?
6-11. La tulipo estas floro.
6-12. Kiu estas la tulipo?
6-13. Ĝi estas la tulipo.
6-14. Kiu sinjoro laboras diligente?
6-15. La alta sinjoro laboras diligente.
6-16. Kiu floro plaĉas al vi?
6-17. La rozo plaĉas al mi.
6-18. Kiu besto kuras rapide?
6-19. La hundo kuras rapide.
6-20. Kia estas la flegistino?
6-21. La flegistino estas afabla.
6-22. Kia urbo estas Tokio?
6-23. Tokio estas bela kaj granda urbo.
6-24. Kia libro ĝi estas?
6-25. Ĝi estas lernolibro.
6-26. Kian koloron ĝi havas?
6-27. Ĝi estas ruĝa. Ĝi havas ruĝan koloron.
6-28. Kies libro ĝi estas?
6-29. Ĝi estas mia libro.
6-30. Ĝi estas la libro de mia patro.
6-31. Kies libron vi havas?
6-32. Mi havas lian libron.
6-33. Mi havas libron de la amiko.
6-34. Kies domo estas bela?
6-35. Lia domo estas bela.
6-36. Domo de lia patro estas bela.
6-37. Kie vi loĝas?
6-38. Mi loĝas ekster Tokio.
6-39. Kie situas Japanio?
6-40. Japanio situas en Azio.
6-41. Kie estas la Japana Esperanto-Instituto?
6-42. Japana Esperanto-Instituto sidas en la centro de Tokio.
6-43. Kien vi iras?
6-44. Mi iras hejmen.
6-45. Kial vi lernas Esperanton?
6-46. Mi lernas Esperanton, ĉar ĝi estas facila kaj utila.
6-47. Mi lernas Esperanton por vojaĝi tra la mondo.
6-48. Kial Doktoro Zamenhof kreis Esperanton?
6-49. Doktoro Zamenhof kreis Esperanton por mondpaco.
6-50. Kial vi vizitis Japanion?
6-51. Mi vizitis Japanion por renkonti malnovajn amikojn.
6-52. Kial vi telefonis al mi hieraŭ?
6-53. Mi telefonis al vi hieraŭ por redoni la libron.
6-54. Kial vi verkis la libron?
6-55. Mi verkis la libron, por ke vi lernu Esperanton facile.
6-56. Kiel vi fartis?
6-57. Mi fartis bone kun miaj familianoj.
6-58. Kiel li veturis al Rusio?
6-59. Li veturis al Rusio per aviadilo.
6-60. Kiel afabla ŝi estas!
6-61. Kia malsaĝulo li estas!
6-62. Kiam vi lernas Esperanton?
6-63. Mi lernas Esperanton vespere. (=en vespero)
6-64. Kiam vi eklernis Esperanton?
6-65. Mi eklernis Esperanton antaŭ du jaroj.
6-66. Kiam vi forlasos Japanion?
6-67. Mi forlasos Japanion post unu jaro.
6-68. Kiom da Esperantistoj estas en la ĉambro?
6-69. Dek homoj estas en la ĉambro.
6-70. Kiom da tagoj vi restos en Koreio?
6-71. Mi restos dum tri tagoj en Koreio.
6-72. Kiom da mono vi havas?
6-73. Mi havas kvinmil enojn.
6-74. Kiom da akvo estas en la akvujo?
6-75. Multe da akvo estas en la akvujo.
6-76. Kiom da familianoj vi havas?

# Ĉiutaga ekzercado 2

*el Baza Lernolibro de Esperanto*

6-77. Mi havas kvin familianojn.
7-1. Paroli estas facile.
7-2. Ĉu vi volas viziti malnovajn urbojn?
7-3. Ĉu vi povas viziti malnovajn urbojn?
7-4. Ĉu vi devas viziti malnovajn urbojn?
7-5. Mia hobio estas kolekti la poŝmarkojn.
7-6. Estas la horo ekiri al mia domo.
7-7. La libro estas malfacila por legi.
7-8. Mi laboras por gajni monon.
8-1. Ĉu li estas la tria knabo?
8-2. La unuaj libroj de Esperanto estas legindaj.
8-3. Unue, ni devas labori diligente.
8-4. Milionoj da homoj amasiĝis en la placo.
8-5. Sen saĝo oni estas nulo.
8-6. Du kaj tri estas kvin.
8-6. Du plus tri faras kvin.
8-7. Dek minus kvin estas/faras kvin.
8-8. Okoble tri estas/faras dedek kvar.
8-9. Dudek dividite per tri estas/faras ses kaj restas du.
8-10. Kioma horo nun estas?
8-11. Estas la tria (horo) kaj dudek minutoj.
8-12. Estas ia sepa (horo) kaj unu minuto.
8-13. Estas la kvina (horo) kaj duono.
8-14. Estas dek minutoj antaŭ la sepa (horo).
9-1. Kio vi estas?
9-2. Kio estas via profesio?
9-3. Kio estas homaranismo?
9-4. Tio estas domo de mia amiko.
9-5. Io estas en la tirkesto.
9-6. Ĉio estas en via koro.
9-7. Nenio estas en la monujo.
9-8. Kiu vi estas?
9-9. Kio estas via nomo?
9-10. Tiu estas sinjoro Sano.
9-11. Iu vokis min sur la strato.
9-12. Mi disdonis la libron al ĉiu.
9-13. Ĉiuj diras, ke Esperanto estas la internacia lingvo.
9-14. Neniu estas en la ĉambro.
9-15. Kia estas la fraŭlino el viaj klasanoj?
9-16. Tia koloro ne plaĉas al mi.
9-17. Ŝi ĵetis iajn vortojn al mi.
9-18. Ĉia dono estas bono.
9-19. Nenia ideo aperis en mia kapo.
9-20. Kiu lando estas vizitinda?
9-21. Tiu floro floras en la kamparo.
9-22. Iu knabo perdis la vojon.
9-23. Ĉiu persono havas propran karakteron.
9-24. Neniu laboristo estas en la laborejo.
9-25. Kies libro ĝi estas?
9-26. Ties koloro estas blanka.
9-27. Ies voĉon mi aŭdis.
9-28. Ĉies lingvo estas Esperanto.
9-29. Nenies okuloj favoris lin.
9-30. Kie viaj gepatroj loĝas?
9-31. Kien vi volas iri?
9-32. Tie estas mia preĝejo.
9-33. Ie loĝas mia malnova amiko.
9-34. Ĉie troviĝas bonaj homoj en la mondo.
9-35. Nenie mi vidis tiel honestan personon.
9-36. Kiel vi pensas pri la problemo?
9-37. Ankaŭ mi pensas tiel.
9-38. Iel ŝi solvos sian hejmtaskon.
9-39. Ĉiel li helpls al mi.
9-40. Vi neniel venkos lin.
9-41. Kial vi lernas la lingvon?
9-42. Tial mi ridegis gaje.
9-43. Ial li ne venis hodiaŭ.
9-44. Tio estas ĉial bona.
9-45. Nenial li koleras.
9-46. Kiam vi eklernis Esperanton?
9-47. Tiam li ne estis en la domo.
9-48. Iam vi povos rerenkonti lin.
9-49. Ĉiam ŝi pensas pri vi.
9-50. Neniam mi atendos ŝin.
9-51. Kiom da landoj vi vojaĝis?
9-52. Tiom da libroj ankaŭ mi havas.
9-53. Donu iom da sukero.
9-54. Neniom da akvo estas en la akvujo.
9-55. Ĉu vi deziras havi ĉiom?
9-56. Kiom da Esperantistoj estas en Japanio?
9-57. Multaj Esperantistoj estas en Japanio.
9-58. Kiom da mono vi havas?
9-59. Mi havas kvinmil usonajn dolarojn.
9-60. Ĉiu havas sian propran guston.
9-61. Mi vokis ĉiun el ili aparte.
9-62. Ĉiuj rapide kuris, ĉiu revenis al sia hejmo.
10-1. Se mi estus riĉa, mi aĉetus la aŭton.
10-2. Se mi estus sana, mi povus vivi longe.
10-3. Se mi havus flugilojn, mi flugus al vi.
10-4. Se mi estus Dio, mi povus fari tion.
10-5. Ĉu vi volus trinki kafon?
10-6. Ĉu vi povus porti ĝin al mi?
10-7. Se vi lernos Esperanton, mi donos lernolibron al vi.
10-8. Se vi lernus Esperanton, mi donus lernolibron al vi.
10-9. Ŝi vekiĝis je la 7-a horo matene.
10-10. Li estas alta je 2 metroj.
10-11. Mi prenis je ŝia mano.
10-12. Vi havas rajton je tio.
10-13. Li estas vundita je la piedo.
10-14. Estas la dua horo kaj dek minutoj.
10-15. Hodiaŭ neĝos.
10-16. Pluvas multe.
10-17. Estas varme.
10-18. Estas trankvile.
10-19. Estas agrable.
10-20. Estas necese.
10-21. Estas komforte.
10-22. Paroli estas facile.
10-23. Estas mirinde, ke li sukcesis.
11-1. Li studas tiel diligente kiel mi.
11-2. La kato kuras tiel rapide kiel la hundo.
11-3. Li estas tiel saĝa kiel Zamenhof.
11-4. Li estas tiel afabla kiel mia instruisto.
11-5. Ŝi estas tiel eleganta kiel mia fratino.
11-6. Li estas tiel bona kiel la patro.
11-7. Ĉu li estas pli forta oi mi?
11-8. Esperanto estas pli facila ol la angla lingvo.
11-9. Li estas malpli laborema ol ŝi.
11-10. Ŝi parolas pri la afero malpli serioze oi mi.
11-11. Li estas la plej kuraĝa el miaj klasanoj.
11-12. Ĉi tiu birdo flugas la plej malrapide el la birdoj.
11-13. Li estas unu el la plej famaj verkistoj en la mondo.
11-14. Mi estas la malplej aktiva el miaj familianoj.
11-15. Ĝi estas la malplej kosta vestaĵo en la vendejo.
11-16. Kies domo estas la malplej larĝa en la vilaĝo?
12-1. Mi estas manĝanta la bongustaĵon.
12-2. Mi estas laborinta en la laborejo.
12-3. Mi estas ironta al la domo de mia amiko.
12-4. La kato estis manĝanta la fiŝon.
12-5. La kato estis manĝinta la fiŝon.
12-6. La kato estis manĝonta la fiŝon.
12-7. Mi estos instruanta la korean lingvon.
12-8. Mi estos instruinta la korean lingvon.
12-9. Mi estos instruonta la korean lingvon.
12-10. La pordo estas fermata de la knabo.
12-11. La pordo estas fermita de la knabo.
12-12. La pordo estas fermota de la knabo.
12-13. La domo estis konstruata de la laboristoj.
12-14. La domo estis konstruita de la laboristoj.
12-15. La domo estis konstruota de la laboristoj.
12-16. La ĉielo estos kovrata de la nubo.
12-17. La ĉielo estos kovrita de la nubo.
12-18. La ĉielo estos kovrota de la nubo.
13-1. Mi ludas la pianon.
13-2. La piano estas donacita de miaj gepatroj.
13-3. Mi ludas la pianon, kiu estas donacita de miaj gepatroj.
13-4. Mi lernas Esperanton.
13-5. Doktoro Zamenhof kreis Esperanton antaŭ cent jaroj.
13-6. Mi lernas Esperanton, kiun doktoro Zamenhof kreis antaŭ cent jaroj.
13-7. Mi havas la belan ĝardenon.

# Ĉiutaga ekzercado 3

*el Baza Lernolibro de Esperanto*

13-8. La koloro de la ĝardeno estas verda kaj flava.
13-9. Mi havas la belan ĝardenon, kies koloro estas verda kaj flava.
13-10. Mi manĝas ion, kio estis bongusta.
13-11. Li ne komprenis tion, kion mi diris.
13-12. Mi batis mian fraton, kiu estas malbona.
13-13. Mi batis mian amikon, kiu estas maldiligenta.
13-14. La brilo, kion mi vidis, estis orero.
13-15. Mi vizitis mian hejmlokon.
13-16. Mi loĝis en mia hejmloko antaŭ dek jaroj.
13-17. Mi vizitis mian hejmlokon, kie mi loĝis antaŭ dek jaroj.
13-18. Mi renkontis lin hodiaŭ matene.
13-19. Mi promenis en la parko hodiaŭ matene.
13-20. Mi renkontis lin hodiaŭ matene, kiam mi promenis en fa parko.
14-1. Ankaŭ mi estas komencanta Esperandsto.
14-2. Ĉu li ankoraŭ laboras en la laborejo?
14-3. Mi apenaŭ kaptis la kurantan trajnon.
14-4. Mi ekiros, apenaŭ mi finos la laboron.
14-5. Ŝi ne diris eĉ unu vorton antaŭ mi.
14-6. Li loĝas kun sia panjo for de la urbo.
14-7. Ili forlasis la domon hieraŭ nokte.
14-8. Jam estas tempo iri hejmen.
14-9. Jen, li malaperis subite.
14-10. Jen estas la seĝo por vi.
14-11. Li ĵus foriris kun longa nazo.
14-12. Mi amas ŝin kiel min mem.
14-13. Nur du homoj vizitis min hodiaŭ matene.
14-14. Ĉu li estas la plej bona el viaj konatoj?
14-15. Ŝi estas pli ĉarma ol rozo.
14-16. La soldatoj plu marŝis per rapidaj paŝoj.
14-17. Mi tuj rimarkis, ke li estas honesta.
14-18. Li aspektas almenaŭ kvardek jara.
14-19. Baldaŭ li venos al mia domo.
14-20. Ĉirkaŭ dek samideanoj estas en la ĉambro.
14-21. Mi renkontis lin hieraŭ en mia laborejo.
14-22. Hodiaŭ li estas serioze malsana.
14-23. Morgaŭ mi iros al la preĝejo kun miaj gefiloj.
14-24. Ŝi estas ja sincera oficistino.
14-25. Jes, li ĉiam kaj ĉie diras la veron.
14-26. Li ne venis al mi hieraŭ vespere.
14-27. Li estas dormanta kvazaŭ mortinto.
14-28. Aŭdinte la novaĵon, li tre surpriziĝis.
14-29. Tro da kuiristoj kaĉon difektas.
14-30. Li hastas tro urĝe.
14-31. Nun li estas tre okupita pro la ofico.
14-32. Preskaŭ ĉiuj homoj venis ĝis la kvina horo.
14-33. La birdo sur la ĉielo rapide flugas suden.
14-34. La figuro de la fluganta birdo estas vere bela.
14-35. Li rakontis al mi sincere amike.
15-1. Mi iras al mia domo, kiu sidas en la nordo de Tokioo.
15-2. Mia onkb donis la libron al mi.
15-3. Ŝi diligente laboris anstataŭ mi.
15-4. Antaŭ la domo staras arboj.
15-5. Li revenis al la domo antaŭ unu horo.
15-6. Apud mia domo loĝas mia amika  amiko.
15-7. Ŝi restas ne ĉe mia domo, sed apud la mia.
15-8. La luno rondiras ĉirkaŭ la tero.
15-9. Kiom da homoj estas en la ĉambro?
15-10. Kiom da mono estas en via monujo?
15-11. De kiu vi ricevis la ruĝan floron?
15-12. Ĝi estas libro de mia patro.
15-13. Li kuris ŝvitante dum du horoj laŭ la rivero.
15-14. Li staras ekster la pordo kun pluvo.
15-15. Ŝi estas la plej eleganta el la klasanoj.
15-16. La flago pendas el la fenestro.
15-17. Ĉu vi loĝas en tiu ĉi urbo kun viaj gepatroj?
15-18. Mi laboris ĝis la kvina horo hieraŭ.
15-19. Inter du landoj estas etaj insuloj.
15-20. Je kioma horo vi vekiĝis?
15-21. Mi vekiĝis je la kvina frumatene.
15-22. Li estas alta je 2 metroj.
15-23. La domo staras kontraŭ la rivero.
15-24. Krom Esperanto, mi povas paroli germanan lingvon.
15-25. Mi volas vivi kun vi feliĉe en bela kamparo.
15-26. Sen libero, ni ne povas vivi.
15-27. La akvo fluas laŭ la rivero.
15-28. Malantaŭ la domo staras granda roko.
15-29. Malgraŭ la problemoj, la afero estis solvita de li.
15-30. Ĉu vi volas vojaĝi tra la mondo per aviadilo?
15-31. La patrino disdonis la pomojn po tri al la filoj.
15-32. Li pasis preter mi sen saluto.
15-33. Oni temas pri la internacia politika situacio.
15-34. Mi laboras kun plezuro por mia estonto.
15-35. Mi pagis kvinmil enojn por la nova libro.
15-36. Ĉu ŝi ploras pro malĝojo aŭ malsano?
15-37. Sub la ponto, la ŝipo pasas malrapide.
15-38. La libelo flugas libere super la rivero.
15-39. Ĉu la manĝaĵo estas sur la tablo?
15-40. Tra la kamparo, ĉevaloj kuras rapide.
15-41. Ĉu li loĝas trans la monto?
15-42. La birdoj flugis trans la maron.
15-43. Post tri monatoj, mi vojaĝos al Afriko.
16-1. Ĉu la knaboj estas bonaj amikoj?
16-2. Ĉu ili estas malbonaj najbaroj?
16-3. Ĉu li estas diligenta laboristo?
16-4. La dormemulo estas maldiligenta.
16-5. Via koro povas esti la plej granda en la mondo.
16-6. La ĉambro de mia filino estas malgranda.
16-7. Lia patro estas la fama artisto.
16-8. La bopatro estas la patro de mia edzino.
16-9, Mia filo estas verkisto.
16-10. Ĉu via bofilo estas inĝeniero?
16-11. Kiom da fratoj vi havas?
16-12. Li estas mia dua bofrato.
16-13. Kiom da amikoj vi havas en la mondo?
16-14. Ĉu viaj geamikoj fartas bone?
16-15. Mia patro estas la unua filo de mia avo.
16-16. Kiel fartas viaj gepatroj?
16-17. Kiel loĝas viaj fratoj?
16-18. Kiom da gefratoj vi havas?
16-19. Ĉu li iris al la lernejo?
16-20. Ili ekiris en la frua mateno.
16-21. Li kriis laŭte kun ĝojo.
16-22. Ŝi ekkriis pro la neatendita atako.
16-23. La oro hele brilas.
16-24. La stelo ekbrilas sur la ĉielo.
16-25. Ĉu li venis de la najbara vilaĝo?
16-26. Ĉu via amiko revenis malfrue?
16-27. Ĉu vi memoras vian malnovan amikon?
16-28. Li rememoris sian belan memoron.
16-29. Mia patro donis la monon al mi.
16-30. Ĉu vi redonis la libron al ŝi?
16-31. Kvankam (ŝi estas) riĉa, ŝi vestas sin tre modeste.
16-32. Li eliris malgraŭ mia malpermeso.
16-33. Ĉu li donis la libron al vi?
16-34. Ŝi disdonis la panon al ili.
16-35. La rozoj disfloras en la ĝardeno.
16-36. La ŝtoneto falis de la ŝtonego.
16-37. La ponto disfalis abrupte.
16-38. Ĉu li estas la prezidanto de nia klubo?
16-39. Li estas la eksprezidanto de nia societo.
16-40. Ĉu la vestaĵo estas lastamoda?
16-41. Li vestis sin en la eksmoda vestaĵo.
16-42. Li estas mia sincera edzo.
16-43. Ĉu li estas via eksedzo?
16-44. Ĉu vi komprenas miajn vortojn?
16-45. Li miskomprenis mian sugeston.

# Ĉiutaga ekzercado 4

*el Baza Lernolibro de Esperanto*

16-46. Ĉu via patro labaras en Osako?
16-47. Kiel via prapatro loĝis antaŭ cent jaroj?
16-48. Kun kiu via avo loĝas en la sejmloko?
16-49. Ĉu lia praavo vivis feliĉe?
16-50. Ĉu li estas simpatia homo?
16-51. Kiel la prahomo faris fajron?
16-52. Ĉu li estas kapabla prezidento?
16-53. Nia vicprezidento estas tre honesta persono.
16-54. Ĉu li estas nova ministro?
16-55. Kia estas la eksa vicministro?
16-56. Ĉu li estas kuraĝa knabo?
16-57. La knabino estas mia dua filino.
16-58. Ĉu via kato estas aminda?
16-59. La katinoj dormas sub la lito.
16-60. En Biblio estas la instruoj de Jesuo.
16-61. Li estas instruisto en elementa lernejo.
16-62. La paco estas espero de la homaro.
16-63. Oni vokas nin pacistoj.
16-64. Mia familio konsistas el kvin personoj.
16-65. Kiom da familianoj vi havas?
16-66. Ĉiuj familianoj estas sanaj.
16-67. Nia klubo havis kunsidon hieraŭ.
16-68. Ĉu ŝi estas la klubano de Zamenhofa klubo?
16-69. Ĉu via frato estas pli juna ol mi?
16-70. La junulo devas havi ambicion.
16-71. Ĉu la malsanulo iris al la malsanulejo?
16-72. Hodiaŭ matene mi trinkis kafon.
16-73. Ni renkontiĝos je la sesa horo ĉe kafejo.
16-74. Mi skribas leteron al miaj amikoj en la mondo per reta poŝto.
16-75. La skribilo estas necesa por skribi leteron.
16-76. Ŝi tondas ŝiajn longajn harojn.
16-77. Ĉu li tondas la branĉojn de la arbo per tondilo?
16-78. Ĉu li havas sufiĉe da mono?
16-79. Mia monujo estas malnova.
16-80. Ĉu la kandelo estas en la tirkesto?
16-81. Li metas la kandelon sur la kandelingon.
16-82. Ŝia vesto estas eleganta kaj hela.
16-83. Li portas vestaĉon kvazaŭ almozulo.
16-84. Ĉu la domo de via amiko estas du etaĝa?
16-85. Kiu loĝas en la domaĉo?
16-86. Ĉu vi povas paroli en hispana lingvo?
16-87. La parolado de la profesoro estis impresa.
16-88. Ĉu la bebo dormas profunde?
16-89. Li dormadas dolĉe kaj trankvile.
16-90. Li manĝas manĝaĵon bonguste en la manĝejo.
16-91. Ĉu la manĝaĵo estas pika?
16-92. La diraĵo de la patro estas severa.
16-93. Mi pakas mian sakon por vojaĝo.
16-94. Ŝia pakaĵo estas peza kaj granda.
16-95. Mi plantis la arbon hieraŭ.
16-96. Tra la arbaro multaj homoj trapasis.
16-97. Ĉu li estas sincera kaj homa homo?
16-98. La paco estas bela sonĝo de la homaro.
16-99. Kial vi volas gajni monon?
16-100. En mia poŝo estas nur monero.
16-101. Ĉu tio estas via domo?
16-102. La domego de mia amiko estas granda.
16-103. Hodiaŭa vetero estas varmega.
16-104, Lia hela rido ĉiam donas ĝojon al ni.
16-105. Ŝi ĵetas rideton al mi.
16-106. Kiam via Esperanto-amiko venos el Ĉinio?
16-107. Nia amikeco daŭros eterne.
16-108. Ĉu la bovo de via onklo laboras diligente?
16-109. La bovido estas ido de la bovo.
16-110. Li estas nia bona reĝo.
16-111. Nia reĝido estas ĉarma kaj danda.
16-112. Mia filo dormas en sia lito.
16-113. Ĉu vi estas dormema dum la leciono?
16-114. Ĉu vi ŝatas legi originalan novelon skribita en Esperanto?
16-115, La novelo de la verkisto estis leginda por mi.
16-116. Li manĝas la bongustan pomon.
16-117. La pano, kiu estas farita de panjo, estas manĝinda.
16-118. Li legas la libron pri Esperanto-movado.
16-119. Ĉu la biografio pri Zamenhof estas legenda libro?
16-120. Mi volas manĝi kun miaj familianoj.
16-121. Ĉu ĝi estas manĝebla pano?
16-122. Mia patro estas ĵurnalisto de la gazeto-kompanio?
16-123. Kiu knabino vokas sian paĉjon?
16-124. Ĉu vi komprenas la koron de via patrino?
16-125. Mia panjo estas komprenema.
16-126. Mi havas tri gefratojn.
16-127. La triono de la kongresanoj estas azianoj.
16-128. La gusto de la pano estas dolĉa.
16-129. Bonvolu, gustumi la manĝaĵon. (=Bonvole gustumu)
16-130. Li brakumis sian filinon varme.
16-131. Mi plenumis mian mision sukcese.
16-132. Mi malvarmumis hieraŭ nokte.
16-133. Ni cerbumu por solvi la problemon.
16-134. Proksimume, cent homoj aŭskultis lian prelegon.
16-135. Ĉu ŝi povas fari la bongustan kukon?
16-136. Li fariĝis fama aktoro de usona teatra mondo.
16-137. Mia patrino naskis min en Kioto.
16-138. Mi naskiĝis en la bela urbeto.
16-139. En kiu urbo vi naskiĝis?
16-140. Mi sidas sur la seĝo.
16-141. Li sidigis min sur la seĝo.
16-142. Ĉu la pejzaĝo de la monto estas bela?
16-143. Ŝi beligas la ĉambron.
16-144. Ĉu ŝi havas viglan karakteron?
16-145. Kiel vi volas vigligi la movadon kiel direktoro?
16-146. Mi rigardas belan pejzaĝon.
16-147. Dum du horoj, mi ludis tenison.
16-148. Du horojn mi ludis tenison.
16-149. Mi paŝas en la ĉambro.
16-150. Mi paŝas en la ĉamhron.
16-151. Kien vi iras?
16-152. Mi iras hejmen.